

RECEIVED

Y 31 # 3

PR

APR 19 1923

THE LIBRARY



AMERIKA

ESPERANTISTO



March., 1923

La Verdan Standardon	Harold Rollason	1
Notes and News	E. J. Meriam	2
Tradukoj el Nord-Amerika Literaturo	Dr. Louis Allen	4
Why Learn Esperanto II	The Editor	7
Leteroj de la Majstro II	D-ro Louis Allen	8
Al Esperantistoj de Ciuj Landoj	H. Rulafilo	10
Sur la Botnia Golfo	Saša	12
La Esperanta Movado en Norda Ameriko		14
Tra La Mondo		16
Recenzoj		18

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN OF

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeley Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta Rondo.—L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secretary, 946 Central Ave.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association.—Meets each Monday evening at 8 in Room 12, The Tooke Bldg. Sec., Miss E. Strachan.

TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Club.—Meets every Thursday at 8.30 P.M., at the Friend's Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec., A. P. H. Rollason, Box 123, Terminal A, Toronto.

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanto Klubo.—Meets every Wednesday, at 8.30 P.M., at the Thomson School, XIIth and L Sts., N.W. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.

Kolumbia Esperanto Asocio.—Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P.M., XIIth and L Sts., N.W. Free class at 7.30 P.M. every Wednesday, same address.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ciumonate.

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 1217 7th Ave.

BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P.M. M. Marootian, Secretary.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P.M.

BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society.—Mrs. E. C. Flint, Secretary, 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 607 Breitmeyer Bldg.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.—9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—\$1.00.

HEBRON, NEBRASKA.

La Hebrono Grupo kunvenas ĉiun ĵaŭdon, 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon, 10 A.M., 500 Olive Ave.—Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoepler, Sec., 105 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P.M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo.—S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

OKLAHOMA CITY, OKLA.

La Oklahoma City Esperantista Societo kunvenas dimanĉe. R. E. Dooley, instruisto, 527 North Durland. Ni alte estimus korespondadon pri metodoj de propagando, klasorganizo, kaj studado. C.R.D.S. Oakford, prez., H. Barton, sek.

ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College eldonas 1/2-jaran ĵurnalon, "La Studento," jara abono \$1.00.

PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y, West Phila. High School for Boys. Barco and monthly meetings on third Tuesdays at Hotel Hanover, 12th and Arch Sts. (Barco 6.45; business meeting 7.45 P.M.) Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.)

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanto Stelo de Polujo.—Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 501 N. York Ave.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hallman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P.M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P.M.

Amerika Esperantisto

ORGANO

de la

ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO

507 Pierce Bldg., Copley Square

Boston 17, Mass., U. S. A.

Vol. 31.

Marto, 1923.

No. 3.

La Verdán Standardon

tre alte ni tenu

La plej signifa movado en la mondo hodiaŭ estas Esperanto. Ĝi estas fundamenta kaj pivota.

El multaj fontoj aŭ el unu, el la senfundaj abismoj de la est-inteco fluas la riveretoj de la homa vivo, la rasoj kaj la nacioj, kun siaj diversaj tendencoj kaj karakterizecoj—jes, malfeliĉe, kun siaj antagonismoj kaj suspektoj.

En la nuna tempo ni staras apud la kunfluiĝo de la riveroj, kvazaŭ unuiĝus kiel unu nedigebla torentego, la Yang-tze kiango kaj la Kongo, la Mississippio kaj la Amazono, La Sankta Laŭrenco, la Danubo kaj la Nilo. Kiel povas kunflui sendanĝere kaj utile la miksigantaj akvoj sen la spirito kaj litero de Esperanto, la ilo de frateco kaj interkompreniĝo?

Sed la grandaj ideoj prezentas sin al neakceptemaj koroj. Ili venas al siaj proprajoj, kaj iliaj propruloj ne ricevas ilin. Tamen ni Esperantistoj ne estas inter la nekomprenantoj. Ni scias ke Esperanto estas la espero de la homaro. Atendante la favoran decidon de aliaj organizoj, kiom ajn potenco, ni malgrandigas nian aferon.

Prefere, do, fidu ni al ni mem. Kuraĝe marŝu ni antaŭen. La Verdán Standardon tre alte ni tenu. Ĉar ni Esperantistoj estas pioniroj kaj tien sekvas Komercio, Scienco, Paco kaj Frateco kien antaŭiros Esperanto.

Harold Rollason.

Notes and News

from the Central Office

The Central Office is the vital nerve centre of the Esperanto Association of North America. Messages of interest and cheer come daily to the Secretary's desk. Some of these, through this department of our Magazine, we are passing on for the encouragement and information of our members. We hope that by this means they will develop a stronger sense of unity and be enabled to take a livelier interest in the activities of our Association.

* * *

Heartiest congratulations are extended to Dr. and Mrs. Dana W. Fellows, the announcement of whose marriage at Pasadena, Calif., on December the 6th, was sprung on their unsuspecting friends: Miss Cora Butler, President of the New York Society for many years, is well known to all Kongresanoj, and Dr. Fellows, President of the Portland (Maine) Society, will also be remembered although we have not seen him since the Green-acre Congress.

* * *

Recently we had a call from Messrs. T. Uyeno and M. Habu, representing the "Uneo Komerca Kompanio, Ltd., of Tokio, Japan, Importistoj kaj Eksportistoj." Mr. Uyeno expressed surprise that Esperanto is so little used in business in North America, and says that the Japanese are learning it to use commercially, as it is much easier to master than English. They enjoyed looking over our literature, and especially noted the exhibit of Esperanto Magazines, even finding Japanese issues new to them.

* * *

Mr. and Mrs. Rufus W. Powell of New York are spending the winter at Lake Worth, near Palm Beach, Florida, and as usual are doing propaganda work for "nia kara lingvo." Many have received inspiration from the little leaflet published by Mr. Powell, "The Internal Idea of Esperanto."

The Golden Age of December 8 has a remarkably telling article on Esperanto from the pen of Mr. Thomas Hunter, formerly of Chicago, but now of Pahokee, Palm Beach, County, Florida.

* * *

Mr. B. Whalley Sidwell, 347 Union Place, Akron, Ohio, an Esperantist recently arrived from England, will be glad to hear from samideanoj in his vicinity.

* * *

The Ashland (Ohio) Esperanto Club, sponsored for by L. J. Kent of the High School, has asked for a Charter in E. A. N. A. That they are taking up the study seriously is shown by their orders for the Kellerman Complete Grammar.

* * *

In response to the request for addresses of persons, Ex-Esperantists or those interested, we appreciate replies from Annapolis, Md., Barre, Vt., New Haven, Conn., Pawtucket, R. I., Topeka, Kan., and Wichita Falls, Tex. Whom will we hear from this month?

* * *

That doughty and indefatigable Boy Scout, Rev. J. H. Fazel, has prevailed on the Topeka City Library to send in an order for a fine list of text books, dictionaries and literature, as well as some copies of the Report of the Secretariat of the League of Nations on Esperanto in the Schools. Rev. Fazel has a class of fifteen studying at present.

* * *

If you have not ordered copies of the League of Nations Report on Esperanto in the Schools, and passed them on to Teachers, and School Superintendents, DO IT NOW. It is the best thing in print about an auxiliary language, because it was written from an impartial and unprejudiced standpoint.

* * *

Mr. J. J. Sussmuth, President of the Hudson County Esperanto Society was in town on Monday, and spent some time talking over plans for the coming Congress at North Hudson. The date will probably be the second week in July. The Congress this year will have something of the air of the European meetings. A large hall will be used for the Akceptejo where the Kongresanoj will also eat together, instead of scattering. A play is in preparation and there are signs of a very live congress. Full particulars will be published in the April issue.

La Legendo pri la Postlasaĵo de la Maŭro

Rakonto de Washington Irving (daŭrigo)

Tradukita de D-ro Louis Allen, University of Toronto

Tiu, kiu malfortigas la venton al la tondita ŝafo,—Tiu ankaŭ faciligas la edziĝan jugon al la humila edza kolo. Peregil subtenadis la pezan ŝarĝon de la edzino kaj infanoj kun tiu sama pacienco, kun kiu lia azeno portadis la grandajn akvokruĉojn, kaj kiom ajn li skuadis la orelojn, kiam li estis sola, li tamen neniam kuraĝis eĉ kritiketi la doman mastrumadon de la maldiligenta edzino.

Li amis siajn infanojn ankaŭ, tiel same kiel strigo amas siajn strigidojn, vidante en ili multobligita kaj daŭrigita sian propran bildon, ĉar ili estis ja fortika kurbkrura idaro. Estis por la bona Gil plej granda plezuro—kiam li povis permesi al si tagon de ripozo, kaj havis plenmanon da maravedioj por elspezi—elkonduki la tutan hordon, kaj kun ili—unuj en liaj brakoj, aliaj al-kroĉigantaj al liaj baskoj, la ceteraj kurantaj post li—fari promenadon tra la ĝardenoj de la Vega, dum lia edzino dancadis kun siaj amikinoj en la Angosturas de la Darro.

Estis tre malfrue en unu somera nokto kaj la plimulto de la portistoj de akvo jam ĉesis sian laboron. Post neordinare varm-ega tago tiu nokto estis malvarmeta kaj lumigita de bela luno; ĝi estis efektive unu el tiuj belaj noktoj kiuj invitas la loĝantojn de la sudaj landoj serĉi kompenson por la varmego kaj enuo de la tago en restado sub la libera ĉielo kaj ĝuado de ĝia dolĉa modereco ĝis post noktomezo. Aĉetantoj de akvo trovigis ankoraŭ. Peregil, kiu estis bona kaj diligenta paĉjo, pensis pri siaj malsataj infanoj. “Ankoraŭ unu fojon al la puto,” li diris al si, “por akiri dimanĉan **puchero**’n por la infanoj.” Dirinte tion, li kuraĝe ekgrimpis laŭ la kruta avenuo de la Alhambro, kantante, kaj de tempo al tempo donante al la azeno per bastono sonoranan frapegon sur la flankojn, ĉu por bati la kadencon de la kanto, ĉu por refreŝigi la beston, ĉar en Hispanujo la batado anstataŭas la furaĝon por ĉiuj ŝarĝobrutoj.

Kiam li atingis la puton, li vidis neniun krom iu fremdulo en maŭra vestaĵo, kiu sidis sur la ŝtona benko en la lumo de la luno. Peregil haltis kaj rigardis lin kun miro, al kiu ne mankis ankaŭ iom da teruro, sed la Maŭro pene faris al li signojn, por ke li alproksimiĝu. “Mi estas svenanta kaj malsana,” li diris, “helpu min reiri al la urbo kaj mi donos al vi du fojojn tiom multe, kiom vi povus akiri per viaj kruĉoj da akvo.”

La mizera mieno kaj la petega parolo de la nekonato tuŝis la kompateman koron de la portisto de akvo. “Dio ne permesu,” li diris, “ke mi postulu pagon aŭ rekompencan, farante nur

simplan humanan agon.” Tion dirinte, li helpis la Maŭron sidigi sur la azeno, kaj foriris al Granado, malrapide, ĉar la kompatinda musulmano estis tiel senforta, ke Peregil devis teni lin solide, por ke li ne falu de la azeno.

Alvenante la urbon, la portisto de akvo demandis la Maŭron, kien li devas konduki lin. “Ho ve!” li respondis, “mi estas fremdulo, mi havas nek domon nek loĝejon. Permesu al mi pasigi la nokton sub via tegmento kaj mi bone rekompencos vin.”

Tiamaniere la bona Peregil sin trovis neatendite ŝargita per neverkreda gasto, sed li estis tro bonkora por rifuzi la ŝirmon de sia tegmento al kunhomo troviĝanta en tia mizera situacio, kaj li kondukis la Maŭron al sia domo. La infanoj, aŭdinte la alvenon de la azeno, eliris sur la straton kaun malfermitaj buŝoj, laŭ sia kutimo, sed vidinte la nekonaton kun la turbano sur la kapo, ili tuj forkuris kun teruro kaj kaŝis sin malantaŭ la patrino. Tiu ĉi elpaŝis kuraĝe, simile al kokino, kiu kun starigitaj plumoj defendas siajn kokidojn kontraŭ iu vaganta hundo.

“Kian neverkredan kunulon vi tiel alkondukas en la nokto,” ŝi ekkriis, “por altiri sur nin la okulojn de la Inkvizicio?”

“Trankviliĝu, sinjorino,” respondis la Galiciano; “jen estas kompatinda malsana fremdulo, kiu havas nek amikojn nek domon; ĉu vi volas elpeli lin, por ke li pereu en la stratoj?”

Si estis ankoraŭ protestonta, ĉar, kvankam ŝi loĝis en domaĉo, ŝi obstine defendadis la honoron de sia domo; sed tiufoje la portisto de akvo sin montris necedema kaj rifuzis submetiĝi al la edziĝa jugo. Li helpis la musulmanon malsupreniĝi de la azeno, kaj sternis por li sur la teron en la plej malvarmeta parto de la domo maton kaj ŝafan pelton, la solan litajon, kiun permesis al li lia malriĉeco.

La kompatindan Maŭron baldaŭ atakis fortegaj konvulsioj, kontraŭ kiuj nenion efikis ĉiuj rimedoj de la simpla portisto de akvo. La okuloj de la malfeliĉa suferanto esprimis dankon al la bonfaranto. Kiam la konvulsioj ĉesis momenton, li vokis al si la Galicianeton kaj alparolis lin per malforta voĉo: “Mi sentas, ke la morto alproksimiĝas. Se mi mortos, mi lasos al vi, kiel rekompencon por via kompatemeco, ĉi tiun skatoleton.” Dirante tion, li malfermis la burnuson kaj montris skatoleton el santalo, alligitan al sia korpo. “Dio donu, amiko,” respondis la bona Peregil, “ke vi vivu multajn jarojn por ĝui vian trezoron, kio ajn ĝi estas!” La Maro skuis la kapon; li metis la manon sur la skatoleton kaj estis dironta pri ĝi ion plu, sed la konvulsioj revenis pliortaj ol antaŭe, kaj post momento li mortis.

La edzino de la portisto de akvo estis nun frenezulino. “Tio devenas,” ŝi diris, “de via malsaĝa bonkoreco kaj de via emo ĉiam elmeti vin al danĝeroj por helpi la aliajn. Kio fariĝos kun

ni, kiam oni trovos ĉi tiun kadavron en nia domo? Oni akuzos nin pri mortigo kaj metos nin en la malliberejon, kaj eĉ se oni ne kondamnos nin la notarioj kaj **alguazil'o**j nin ruinigos.”

La malfeliĉa Peregil sin trovis en vere malagrabla situacio, kaj li komencis preskaŭ bedaŭri sian bonfaron. Fine li ekpensis: “Estas ankoraŭ nokto; mi povas transporti la kadavron el la urbo kaj enterigi ĝin en la sablo sur la bordo de la Xenil. Neniu vidis la Maŭron enirantan en mian domon kaj neniu scios pri lia morto.”

Li faris kiel li diris. La edzino lin helpis; ili envolvis la kadavron de la malfeliĉa Maŭro en la mato, sur kiu li agoniis, ŝarĝis ĝin sur la azenon, kaj Peregil foriris kun ĝi al la riverbordo.

Kontraŭ la domo de la portisto de akvo loĝis, bedaŭrinde, barbiro, nomata Pedrillo Pedrugo, kiu estis unu el la plej sciivolaj, plej babilemaj, kaj plej malicaj anoj de sia babilema gento. Li havis mustelan vizaĝon kaj araneajn krurojn, kaj estis ruza, trudigema kaj flatema; lia universala sciado pri la aferoj de siaj najbaroj ne estis superata eĉ de la fama barbiro de Sevilo, kaj li havis tian saman retenkapablon kiel kribrilo. Oni rakontadis, ke kiam li dormis, li fermis nur unu okulon, kaj lasis nekovrita unu orelon, kaj tiamaniere povis vidi kaj aŭdi ĉion, kio okazis, eĉ dormante. Ĉiaokaze estas certe, ke li servis al la sciemuloj de Granado kiel speco de skandala kroniko, kaj havis pli multe da klientoj ol ĉiuj liaj sammetianoj kune.

Ĉi tiu sintrudema barbiro aŭdis la malfruan revenon de Peregil kaj la kriadon de la edzino kaj infanoj. Lia kapo tuj ekaperis malantaŭ fenestreto, kiu servis al li kiel observejo, kaj de tie li vidis sian najbaron, kiu subtenis fremdulon en maŭra vesto kaj kondukis lin en la domon. Tio estis tiel stranga afero, ke Pedrillo Pedrugo tute ne dormis dum la tuta nokto. Ĉi-momente li revenadis al la fenestreto kaj rigardadis la lumon elirantan tra la fendoj en la pordo de l' najbaro. Ĵus antaŭ la tagiĝo li vidis Peregil elirantan kun la azeno pli ŝarĝita ol kutime.

La scivolema barbiro estis tre ekscitita; li rapide surmetis la vestojn, kaj senbrue elŝteligante el la domo, li de malproksime sekvadis la portiston de akvo ĝis kiam li vidis, ke tiu ĉi fosas sur la sabla bordo de la Xenil kaj enterigas ion havantan la aspekton de kadavro.

Konstatinte tion, la barbiro foriris domen, kie li senpacience renversadis ĉion en la barbarejo ĝis la tagiĝo. Tiam li prenis pelvon sur la brako kaj foriris al la domo de sia ĉiutaga kliento la alkaldo.

(Daŭrigota)

Why Learn Esperanto

The Editor

Possibly you belong to that great body of people who morally and spiritually are "out of work." You feel that you have abilities and responsibilities. You have become able to apprehend the claims of society. You want to think and work for man and not "for that fraction of man which is yourself." Yet you have not been able to find the work for which you are precisely fitted.

Doubtless you are a man or woman of many interests. You belong to several societies whose conflicting duties and simultaneous times of meeting are a continual embarrassment. One or several of these societies aim either directly or indirectly at the betterment of the world. Strange that so many of us should blithely undertake so high a task! It was willed in a moment of insight and enthusiasm which did you credit and revealed you to yourselves, but alas the hours of gloom did not find the task fulfilled.

You found that "eternal principles universally recognized in theory are apt to be disregarded and undervalued in practice." You are not satisfied. You are weary of merely singing hymns, passing resolutions and paying subscriptions. You want to be doing something yourselves. That interior moral energy of yours cries out for work. You feel that you must at all hazards play a part in the great onward sweep of Progress. But how?

We are convinced that in Esperanto you will find an extraordinarily satisfactory answer to your problem. Esperanto is something that you can begin to do at once. It will satisfy that inward urge of yours for definite and helpful action. It will not arouse any misgivings as to your fitness for the task, and from the first moment you will discover it to be an application of the elevated principles which you profess.

Esperanto is more than a language. It is a spirit, a principle. It is an utterly satisfying blending of the practical and the ideal. It is a currency of ideas which leaves him wealthier who hands it on. It will make you rich to great purposes. It will enable you to "shape your old course in a country new," that country which is the boundless fatherland of the new humanity.

Leteroj de la Majstro

D-ro Louis Allen

Malfermante ĉi tiun rubrikon en la lasta numero de AE, ni ankoraŭ ne vidis la numeron de La Nova Epoko por aŭgusto, 1922, en kiu la redaktoroj de tiu gazeto esprimis la saman deziron: “baldaŭ vidi eldonita ne nur la tutan verkaron de L. L. Zamenhof, sed ankaŭ lian intereseĝan leteraron,” kaj ankaŭ publikigis du neniam antaŭe presitajn leterojn de la Majstro. Ni esperas, ke La Nova Epoko baldaŭ publikigos aliajn leterojn.

Car, bedaŭrinde, ne ĉiuj niaj abonantoj legas La Novan Epokon, ŝajnis al ni dezirinde represi la du leterojn tie ĉi. Ambaŭ leteroj estas el la epoko de la reforma agitado (vidu la ĉapitron VIII de Historio de la Lingvo Esperanto de Edmond Privat), kaj estas adresitaj al “la pioniro de Esp. movado en Orienta Ruslando, D-ro J. Guminski en vil. Rovnoje (Samara gub.)”

I

Varsovio, 21—VII (2—VIII) 1890

Tre estimata amiko!

La 20 milrejsojn mi ricevis kaj mi sendas al Vi mian koran dankon en la nomo de nia amata afero. En la komenco mi intencis sendi ilin al s-ro Schmidt por la kaso de la Ligo internacia, sed la Ligo en ĝia nuna formo estis fondita sen mia scio kaj sen mia volo, kvankam la redaktoro presis la Regularon en mia nomo kaj kun mia antaŭparolo. Mi kreis Regularon tute alian; sed s-ro Schmidt, ne dirinte al mi eĉ unu vorton ŝanĝis la tutan fundamenton de mia Regularo kaj donis al ĝi sub mia nomo tian formon, kian mi tute ne povas aprobi. Por eviti tiajn surprizojn, kiujn faras al mi s-ro Schmidt, mi intencas baldaŭ preni la tutan kondukadon de la afero en mian propran manon). Ne sciante ankoraŭ, kio estos kun la Ligo, kaj timante, ke ĝi en ĝia nuna formo ne povos sin teni, mi decidis reteni ankoraŭ Vian monon ĉe mi, ĝis la afero de la ligo klariĝos aŭ ĝis Vi mem skribos al mi, kion mi devas fari kun la mono.

Koran saluton de Via L. Kamenhof.

II

Grodno, 29—VIII—1894.

Estimata amiko!

Dank' al la parolado pri reformoj la nuna jaro estas efektive tute perdita por nia afero; tamen ni ne devos tion ĉi tre bedaŭri, ĉar la fina rezultato estos tre bona. La minaca fulmotondro de la reformoj purigis unu fojon por ĉiam la atmosferon plenigitan de nuboj, kaj nun ni havos jam dank' al Dio longan trankvilecon kaj povos energie labori. En la lastaj kelkaj jaroj multaj amikoj komencis postuli reformojn; mi petegadis ilin konstante kaj senĉese, ke ili lasu tiun ĉi demandon, kiu alportos nenium utilon kaj nur tute ruinigos nian aferon; sed neniu volis min aŭdi. Mi kreis Ligon por decidi pri tiuj aferoj, sed ankaŭ tio ĉi ne helpis, ĉar sian nesukceson la reformistoj klarigadis per tio, ke mi estas kontraŭ reformoj. En la fino de la jaro 1893 s-ro Trompeter sciigis min, ke se mi ne elpaŝos persone kun radikalaj reformoj, li ĉesos eldonadi la gazeton; ankaŭ la aliaj reformistoj forte agitadis por reformoj. Tiam alpremita al la muro kaj vidante nenian helpon, mi vole-ne-vole devis cedi kaj elpaŝi kun propono de radikalaj reformoj. Nun dank' al Dio ĉio baldaŭ estos finita; ĉiuj esperantistoj pripensis la aferon kaj konvinkiĝis, kiel danĝeraj nun estas ĉiaj reformoj; nun ni baldaŭ havos oficialan decidon de la plimulto kontraŭ reformoj, —kaj nia afero estos savita, kaj ĉiujn niajn fortojn ni povos nun trankvile uzadi por la vastigado de nia afero. Instruita de la maldolĉa sperto, mi uzas nun ĉiujn fortojn por fari nian aferon finance sendependa de ĉiu aparta persono, kaj por tio ĉi mi komencis la "Bibliotekon." Se la Biblioteko iom post iom atingos la necesan nombron da abonantoj, tiam nia afero komencos rapide kaj brilante progresadi, kaj neniu nubeto jam kovros iam la ĉielon de nia afero.

Kun plej kora saluto

Via L. Zamenhof.

Al Esperantistoj de Ĉiuj Landoj

En tiu ĉi fako de nia gazeto, kiel ni jam estas klariginta en la januara numero, ni deziras diskuti pri kelkaj el la plej gravaj problemoj de la Esperanta movado. Tute nova fenomeno estas Esperanto. La granduloj kaj saĝuloj, la filozofoj kaj pensuloj pli avide ekzamenas nekonatan nebulozon en la profundegoj de la spaco, aŭ diatomon, preskaŭ nevideblan per la mikroskopo, ol grandegan, nunan, homan movadon. Do, al la tasko esplori la esencon de Esperantismo devas sin dediĉi la Esperantistoj mem.

Ni jam povas konstati, ke Esperanto estas ne nur teorio sed fakto. Rilate al ĝia nura uzebleco, la neceso por eksperimentado antaŭ longa tempo malaperis. Sed pri pli gravaj aferoj Esperanto estas ankoraŭ ne sufiĉe provita. Ĝi estas forto nova kaj kun potencoj ankoraŭ neantaŭvideblaj.

Same kiel la eltrovo de la utilo de ŝtono, bronzo kaj fero por ofensiva militado enkondukis inter la homoj la epokojn de ŝtono,

Amerika Esperantisto

Will you help us to make "Amerika Esperantisto" more widely known? A larger circulation means a better magazine, and a better magazine means larger circulation. We suggest that you get every member of your group to take it regularly. Show it to your friends. See that there is a copy in your public Reading Room every month. In these and other ways which may occur to you, help us to make "Amerika Esperantisto" an outstanding success.

Subscription \$1.00 a year.

"Amerika Esperantisto" 507 Pierce Building
Copley Square, Boston 17, Mass., U. S. A.

bronzo kaj fero, tiel same la apliko de tiu ĉi mirinda, pacdonanta ideo enkondukos la epokon de Esperanto.

Pripensu! Tiu ĉi nove eltrovita, potencega ilo estas en la manoj de ni Esperantistoj. Eble la estonteco de la homaro dependas de ni. Ĉu tio ne estas grava respondeco kaj privilegio. Ĉu ni ne devus tre serioze peni kompreni, kio estas Esperanto, kion ĝi faros kaj ankaŭ kiel ĝi devus esti aplikita? Jen estas vasta kampo por studado, esplorado kaj eksperimentado.

Ni devas montri, ke Esperanto estas io pli ol ilo por internacieco. Ĝi estas rimedo por kunigi la homaron. Plue, kun Esperanto, la efektivigo de la homa unuigo ne estas la laboro de registaraj oficistoj aŭ diplomatoj, sed de ni ĉiuj.

En la estinteco ĉiu penado por unuigi naciojn kaj popolojn okazis per forto aganta de la ekstero. Nia celo ne estas tiom ligoj de nacioj kiom propravola frateco de ĉiuj homoj.

Tial, ĝis la tempo kiam la mondo estos tute preta akcepti Esperanton, ĝi devas resti granda, libera movado, tute ne oficiala aŭ altrudata per aŭtoritato, sed alloganta la korojn de homoj per sia propra dolĉa idealeco kaj per la memoferaĵ laboroj de siaj amikoj.

Ni esperas, ke Esperantistoj de aliaj landoj skribos al ni pri tiu ĉi temo. Adresu: H. Rulafilo, Redaktorejo de la Amerika Esperantisto, Box 123, Terminal A, Toronto, Kanado.

H. Rulafilo.

An Esperanto Calendar for 1923

Should certainly be found on your desk. This dainty Esperanto Calendar is printed in two colors on heavy, antique sandbrown paper. Folded to stand on Desk measures 2½ in. x 4 in.

For Personal Satisfaction & Propaganda
Price 5 c. each 12 for 50 c.

THE ESPERANTO OFFICE
507 Pierce Bldg., Boston, Mass.

Sur la Botnia Golfo

Malvarmeta pluvo komencis fali ĝuste kiam nia ŝipo "Birger Jarl" ekforlasis la kajon en Helsinki por iri al Stokholmo. La XIVa finiĝis kaj nun la unuaj forvojaĝantaj kongresanoj jam kuraĝigis la multenombrajn gesamideanojn, kiuj venis por nin adiaŭi per ankoraŭ lasta "ĝis revido"; longatempe ni vidis ilin svingadi mantukojn, ĉapelojn kaj verdajn flagetojn—tiam fine ne plu ili estis distingeblaj.

Kiom da pasaĝeroj troviĝis sur "Birger Jarl" mi ne plu memoras, sed da ge-Eŝperantistoj proksimume 30, el almenaŭ 10 diversaj nacioj; kelkaj estis jam konatuloj, aliaj ne; sed ne daŭris longe antaŭ ol ĉiuj estis anoj de sama rondo familia.

Dume la ŝipo serpentume veturadis inter la multaj insuletoj laŭlonge de la marbordo de Suomi, kiel nomas sian landon la Finnoj. Bela estis la vidaĵo en la sunbrilo, kiu sekvis jam la pluvon. Oni babilis, promenis, fotografis, tagmanĝis kaj denove babiladis. Komenciĝis diskutado, kiamaniere propagandi nian lingvon inter niaj kunpasaĝeroj. Sveda samideano proponis, ke ni ludu ian teatraĵon en Esperanto kaj invitu ĉiujn pasaĝerojn ĉeesti. Kompreneble ni ĉiuj ridis kaj ŝercis je tiu ideo, ĉar nek teatraĵon ni havis, nek scenejon, nek tempon por aranĝoj. "Nu," li diris, "se ni havigos komedieton, ĉu vi, gesinjoroj, promesas esti kunaktoroj?" Ĝenerala interkonsento, kaj laŭta gajeco, sekvis liajn vortojn.

Mi jam tute forgesis pri tiu ĉi afero, kiam ĉe la vespermanĝo iu transdonis al mi folieton; je mia surprizo ĝi estis "Rolo de Amerikanino, kaj aldonita estis peto, ke mi bonvole venu al la antaŭprovo post duonhoru en la fumeja salono sur malantaŭa ferdeko.

Imagu nur! Nia energia Svedo dum nur kelkaj horoj efektive verkis komedieton kaj transskribis dek rolojn, kaj kiam mi poste envenis la nomitan fumejon, mi tie trovis jenajn "geaktorojn": Anglo, Ĉeko, Dano, Kimro, Holandanino, Bulgaro, Germano, Hungaro, krom, kompreneble, nia Sveda "direktoro."

Tre gaja aro da geaktoroj, mi certigas al vi! En la komedio la Svedo estis kelnero en hotelo, ni aliaj la gastoj. Post kelkfoja ripetado ni sciis parkere niajn rolojn, kiuj estis parte naci-lingvaj, parte en Esperanto. Kelkfoje nin interrompis troscivolaj pasaĝeroj, kiuj ne povis atendi ĝis la horo, por kiu la komenco de la teatraĵo estis anoncita.

Fine tiu horo venis. Ĉio bone marŝis. Laŭ ordono de la kapitano, kies permeson ni petis, maristoj bone aranĝis kurtenojn por ŝirmi kontraŭ la forteta vento. La aŭskultantaro konsistis el la kapitano kaj kelkaj aliaj ŝipistoj kaj verŝajne 75 pasaĝeroj. Se oni juĝas laŭ la gajeco, la publiko bone sin amuzis. Je la fino de la ludo nia "kelnero" faris mallongan propagandan paroladon en sveda lingvo, kiun povis kompreni la plej multaj el la ĉeestantoj. Oni ankaŭ disdonis Esperanto-svedajn ŝlosilojn granda-nombre al personoj, kiuj ilin petis.

Oni proponis fari monkoklekton por "Esperanta Ligilo"—la gazeto de blindaj samideanoj, el kiuj unu reprezentanto partoprenis en la teatraĵo. Surprize malavare la publiko respondis al la propono.

Tiamaniere areto da XIV-anoj sin amuzis kaj samtempe propagandis Esperanton sur ŝipo en la Botnia Golfo vespere la 16an de aŭgusto 1922.

Saŝa.

La Esperanta Movado en Norda Ameriko

Sur la dua paĝo de la koverto de nia Gazeto troviĝas nomoj de dudek-du Esperantaj Grupoj. Sendube ekzistas ankoraŭ aliaj. Kial ni ne ricevas novaĵojn de ĉiuj ĉi tiuj Grupoj? Novaĵoj pri la progresado de la movado tra la lando stimulas kaj vigligas nin ĉiujn kaj kuraĝigas izolitajn samideanojn.

Tial sendu al ni regule raporton pri via agado.

La Komitatoj de la E. A. N. A. por la jaro 1922-3 estas la sekvantaj:

E. A. N. A.

Agada Komitato for 1922-23

D. E. Parrish, 1011 Elmwood Avenue, Buffalo, N. Y.
A. P. H. Rollason, Box 123, Terminal A, Toronto
A. S. Vinzent, % Bank of California, San Francisco, Calif.

Publications Committee

G. Winthrop Lee, 147 Milk St., Boston
Dr. D. O. S. Lowell, South Hanson, Mass.
Roger Goodland, 507 Pierce Bldg., Boston

Propaganda Committee

Rev. J. H. Fazel, 720 Lincoln St., Topeka, Kansas (Scouts)
Saul J. Jaffe, 121 Grace St., Flint, Michigan
B. E. Meyers, Redwood City, Calif.
J. H. S. Pearson, 2717 So. 61st St., Cicero, Ill. (suburb of Chicago)
Frank H. Sweet, 20 Webster Avenue, Toronto

Mrs. Alice Wicks, Room 6, Brown Block, Broad St., Victoria
(Vancouver Island, B. C.)

Finance Committee

C. A. Russell, 12 Pond St., Jamaica Plain, Mass. (Boston)
H. T. Fisher, Perth Amboy, N. J.
Miss Jennie Goldings, 507 Pierce Bldg., Boston

Examinations Committee

Prof. Henry W. Hetzel, West Phila. High School for Boys,
40th & Walnut Sts., Phila., Penna.

Usono

The Boston group is flourishing under Dr. Lowell's leadership with over twenty in the new class.

Prof. Louis Lambert, Principal of the Berlitz School in Boston, has opened an Esperanto course.

Prof. Henry W. Hetzell broadcasted on Saturday, Feb. 24th, at Strawbridge & Clothiers', Philadelphia, on "Esperanto in Radio Communication."

Prof. W. J. Knappe, Professor of History and Librarian of Wartburg College (Lutheran), Clinton, Iowa, has a group of a dozen young men studying Esperanto.

Members of a class of the International Bible students in Newport News, Virginia, have just begun the study of Esperanto. They considered the matter very carefully and have taken it up "feeling that it is part of the Lord's Divine plan for the world."

News of the "Wellesley Experiment" has not been confined to this vicinity; word comes about it from many directions. One of our samideanoj has been sending helpful literature to a member of Dr. Ruckmick's class from his own town, and subscribed for an extra copy of Esperanto Triumfonta that he may help keep Wellesley in touch with the Esperanto world.

In a recent Boston paper it is noted that Rev. Robert K. Smith of Westfield, Mass., member of the National Council of Boy Scouts and Chaplain of the international convention in England in 1920, has just sailed for France to lay plans for the International Convention of 1924 at Westfield. "The French and Czechoslovaks leading in the scout movement, are much interested in having the international convention in the United States next year." BOY SCOUTS and LEADERS, take notice:—get your Esperanto classes started and broadcast the news in Europe so the Scouts who are coming will do the same. If the Boy Scouts could give a demonstration of the utility of Esperanto at that convention it would make their fathers and uncles sit up and take notice!

Topeka, Kansas. La tria Esperanta klaso havis interesan festeton en la centra Y. M. C. A. la 14an de januaro.

S-ino Hardy prezidis la programon. La klaso faris al sia instruisto, S-ro Fazel, kristnaskan donacon.

La grupo ankaŭ starigis en la urba biblioteko esperantan "breton" kiu jam entenas pli ol dudek-kvin libroj. La urbo donacis \$15.00 por aĉeti esperantajn librojn.

La Topeka Esperanto-Asocio elektis la sekvantajn novajn oficistojn:

Prezidanto, kapt. Geo. P. Morehouse; Vice. Prez.: Richard H. Gardner; Sekretariino, S-ino Lida R. Hardy; Koresponda Sek-ino, F-ino Leone Newell; Kasisto, D-ro W. J. Robb; Direktoro, Rev. J. H. Fazel.

En Topeka, esperantismo kreskas kaj floras.

LEONE NEWELL, Kor. Sek.

Kanado

Ni ricevis kun plezuro novan numeron de "La Ligilo." Tiu ĉi gazeteto meritas la subtenon de ĉiuj Kanadaj samideanoj.

S-ro Norman Todd, membro de la Toronto Societo, estis nomita Agento de la Skolta Esperantista Ligo.

S-ro Rollason faris paroladon pri Esperanto al la gejunula societo de Knox Presbyterian Church, la 17an de januaro. En Toronto la movado kreskadas kaj preskaŭ ĉiusemajne ni akiras novajn membrojn.

En Montreal S-ro Bardorf faris diversajn paroladojn pri Esperanto. Nova klaso organiziĝis kun dekdu membroj.

Tra la Mondo

Al Eldonistoj kaj Verkistoj

Estu rememorigate pri la grava biblioteko de l' Grupo Esperantista Pariza, ampleksanta jam pli ol 1500 numerojn, kiu nun ree funkcias. Ĉiuj verkoj estas ricevitaj donace, precipe de la eldonistoj mem. Bedaŭrinde, inter aliaj la libroj eksterlande eldonitaj depost 1914 mankas. Ĉar la Grupestraro decidis eldoni Katalogon (kiu estos por ĉiu s-ano utila), estas dezirinde, ke eldonistoj kaj verkistoj bonvolu, eĉ por sia propra profito, sendi la mankantajn verkojn, por ke ili estu menciataj en la Katalogo. Se krome preparolado estas dezirata, oni sendu po 2 ekz. Adreso: Al S-ro bibliotekisto de l' Grupo Esperantista Pariza, 3 rue Thénard 3, Paris 5e." —Represo de tiu sciigo estas dezirinda.

Internacia Kunlaboro de la Katolikoj

La katolika eklezio estas laŭ sia konstitucio internacia, kaj laŭ objektiva juĝo de grandaj historiuloj la sola institucio internacia, kiu dum 1900 jaroj fakte montris internacian karakteron. Tamen la epoko de naonalismo dum la lastpasintaj jarcentoj pli aŭ malpli limigis praktike tiun ĉi teorion ĉiam kaj ĉie rekonatan internacian karakteron, se ankaŭ ĉiam krom la internacia hierarĥio ĉiam vere internaciaj religiaj kaj karitaj institucioj bonege funkciis.

La tutmonda milito, tiu abomeninda eksplodo de nekrista ŝovinismo feliĉe ekvekis en multaj katolikaj rondoj, la fratan konscion de praktistanaj tempoj kaj nun oni klopodas ankaŭ praktike pli kaj pli realigi tiun fratan spiriton, ne por ataki alipensemulojn, sed por kunhelpi al la realigo de Dia regno de amo kaj paco. Unu el la plej gravaj tiucelaj movadoj estas la Internacia Katolika Ligo (Ika), ĉefa internacia oficejo en Graz, Aŭstrio, Karmeliterplatz 5. Per dujara senlaca agado, ĝi disvastigis en la tuta mondo. En 35 ŝtatoj ekzistas naciaj direktoroj, eble 40 ekleziaj altranguloj kuragiĝis favore la laboron. Pli ol 30 grandaj organizoj diverslandaj subtenas la agadon. Granda centra oficejo estas starigata; internacia peresperanta gazeto, disvastigita en 35 ŝtatoj aperas (Katolika Mondo, Paŭlus-eldonejo, Graz, Karmeliterplatz 5). La sama eldonejo internacia elirigis plurajn Esperanto-verkojn, i. a. katolikan preĝlibron. Du internaciaj kongresoj disvastigis la ideon. Ĉefe oni devas rimarki ke Eo praktike faris plej grandan utilon de tiu ne por esperanta ligo; ĉar Eo estas uzata kiel ĉefa interrilata lingvo kaj multaj katolikaj rondoj, plifruue indiferentaj al Eo, nun komencas interesiĝi kaj lerni Eon vidinte ĝian praktikan utilon. Tiu metodo, praktike montrita al la kontraŭuloj de nia helplingvo la grandan praktikan uzeblecon de nia helplingvo laŭ nia sperto pli rapide sukcesigos la disvastigon de Eo. Tiamaniere la ligo havas grandan meriton por disvastigado de Eo en katolikaj rondoj.

Ika, Graz, Aŭstrio, Karmeliterplatz 5.

Adresaro Katolika tutmonda

IKEO (Internacia Katolika Esperanto-Oficejo), eldonos dum la jaro 1923 internacian katolikan adresaron de katolikaj Esperantistoj. Ĉiu katolika samideano povas publikigi sian adreson kun mallonga rimarko: PM, L, PK, ktp. Informojn donas IKEO, Graz, Karmeliterplatz 5, Aŭstrio.

3a Internacia Katolika Agada Kongreso

La 3a internacia kongreso de Ika okazos en Konstanz ĉe Bodensee la 29an de Julio ĝis 2a de Aŭgusto. Estas aranĝata speciala sekcio kie estos pritraktata la grava problemo: kiel sukcese kaj praktike disvast-

igadi nian helplingvon en katolikaj rondoj. Eo estos uzata dum la tuta kongreso, ĉefe kiel traduka lingvo, precipe por montri praktike la grandan taŭgecon de Eo ĉe internaciaj kongresoj. Ĉiulandaj katolikaj samideanoj kore estas invitataj partopreni je nia kongreso, kiu ĝuste finiĝas je malferma tago de la Nürnberga kongreso. Informojn donas "Ika," Graz, Karmeliterplatz 5, Aŭstrio.

* * *

Split, la 19an de novembro, 1922

Estimataj Samideanoj!

La viva simpatio, kies signojn ĉiutage el en kaj eksterlando alportas al ni la poŝto, estas la plej bona pruvo, ke nia ĵus fondita klubo estas necesa kaj grava. Ni atentigas Vin, ke nia urbo (30,000 loĝantoj) estas la ĉefurbo de Dalmatio, lando, kies naturaj riĉaĵoj estas malproksime konataj kaj ĉiujare vizitataj de ĉiam pli kreskanta nombro de ĉiulandaj turistoj. Split, la plej granda sudslava marhaveno, la fama restadejo de la roma imperiestro Diokleciano, sidejo de ampleksa cementa industrio, promesas fariĝi unu el la plej gravaj urboj de nia juna kaj tre interesa sudslava ŝtato.

Vi ne forgesu, ke rilate al la speciala geografia situacio, en nia urbo renkontiĝas Oriento kaj Okcidento, kaj ke la trapasado de multaj diverslingvaj turistoj postulas, ke sur tiu-ĉi marbordo nepre ekzistu forta Esperanta movado. Tion konsiderinte nia novefondita klubo celas unue disvastigi nian Esperanton en ĉiujn pli gravajn dalmatajn lokojn kaj poste fari kune kun la fondota Sudslava Esperanta Ligo necesajn paŝojn por enkonduko de Esperanto el la lernejojn.

Vi scias, ke nuntempe propagando estas multekosta kaj precipe ne eltenebla de ĵus fondita klubo, kies membroj ne posedas sufiĉajn rimedojn por realigi sian idealon. Ni do turnas nin al Vi kun varma peto, ke Vi laŭ Via ebleco sendu al ni:

1. ĉiuspecajn librojn, gazetojn, afiŝojn, reklamilojn por nia ekspozicio
2. konsilojn por trafa kaj sukcesa propagando, varbado, instruado, societaj ludoj, ktp.

Ĉiu eĉ la plej malgranda helpo estas bonvenonta, kaj ĉiu eĉ ne donante librojn aŭ monon povas doni trafajn konsilojn kaj rekomendi al ni la ĝustan vojon por atingi la plej bonan sukceson.

Neniu do rifuzu sian helpon, ĝi estos por ni kara kaj valora. Por nia movado sur tiuj-ĉi krutaj ŝtonegoj, inter niaj palmaj kaj orangaj arbaroj, Vi ne bezonas timi. La nun laborantaj samideanoj ĉi-tie estas veraj apostoloj kaj la semo jetita ne maltrafas celon. Esperanto ĉiutage havas tie-ĉi novajn adeptojn, kiuj per tre entuziasma fervoro senlace ĝin disvastigas kaj garantias ĝian pluan feliĉan vivadon.

De Vi, karaj diverslandaj fratoj, dependas nia estonteco. Se Vi deziras, ke ĝi estu brila kiel nia suno, ne forgesu nin kaj memoru, ke ĉiun Vian helpon Vi povos vidi eternigitan en nia senlaca laborado, se Vi iam per propraj okuloj deziros vidi la fruktojn de nia movado kaj samtempe viziti la vidindajn rokojn, insulojn, golfojn, ruinojn de la roma epoko, ktp.

Neniu el Vi pentos sian helpon, ĉiu estos fiera je ĝi. Akceptu la esprimon de nia dankeco kaj estu kore salutataj, Esperantistoj ĉiulandaj!

ESPERANTA KLUBO EN SPLIT.

(Adreso: Prez. S-ro R. Rupčić, Palmina 9

Recenzoj

Praktika Frazaro (3a eldono) kaj **Komerca Korespondo** (2a eldono) kunmetita de J. Borel, Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H. Berlin kaj Dresden. Ĉi tiuj 46-paĝaj volumetoj estas la numeroj 9 kaj 16 de la konata **Esperanta Biblioteko Internacia**. La unua prezentas interesajn konversaciojn pri diversaj temoj el la ĉiutaga vivo, ekz.: Pri Esperanto, Dum vojaĝo, En restoracio, Serĉado de adreso, En la dogana oficejo, ktp.; la dua prezentas ne modelajn leterojn, sed riĉan kolekton da frazoj kaj formuloj uzataj en la komerca korespondado. Ambaŭ libretoj estas bonstilaj, praktikaj, kaj zorge presitaj, kaj ni rekomendas ilin al niaj legantoj. La prezo de ĉiu volumeto por la altvalutaj landoj estas 180,—m.

Esperanto in Twelve Lessons, A Text-book with the Grammar very simply arranged in Twelve Lessons, followed by Twelve Reading Lessons (with a Key) by Stella. British Esperanto Association, 17 Hart Street, W. C. 1, London. Tiu ĉi malgranda lernolibro prezentas fidindan enkondukon en nian lingvon, kaj havas la avantaĝon ne esti tro longa. Por niaj lernantoj, kiuj havas ordinare nur unu lecionon ĉiusemajne, ni tute ne bezonas lernolibron preskaŭ tiel dikan kiel lernolibro de iu nacia lingvo. Nia gramatiko konsistas ja el 16 reguloj. La prezo de la libreto ne estas montrita, sed ni supozas, ke ĝi estas malalta.

La Fianĉiniĝo de Sovagulineto, triakta komedieto originale verkita de Roksano, Anino de E. L. A., Lingvokomitano. Dua eldono. "Mar-to," Esperanto-eldonejo, Haida, Bohemio, 1922. Prezo 3 ĉeĥaj kronoj. Nia originala literaturo kreskas kaj ni povas facile antaŭvidi la tempon, kiam ĝi ankaŭ havos siajn majstro-verkojn tiel same kiel la naciaj lingvoj. Tiu ĉi komedieto estas leginda, kaj eble ankaŭ ludinda. La stilo estas ĝenerale tre bona. Nur kelkajn kritiketojn ni povus fari, ekzemple koncerne la oftan uzadon de la gallicismo: **Mi skribos al li, mi**, (Je vais lui écrire, moi); la strangan uzadon de "ĉu" anstataŭ "ĉu ne (vere)," ekzemple: **Vi ofte vizitos nin, ĉu, amiko Ĉiopovulo?; estanto, estinto, estonto anstataŭ estanteco, estinteco, estonteco**; eble troan uzon de la vortoj kun -ulineto; **Bontagon** por **Bonan tagon**.

Alno.

International Morality and Japanese Nationalism is the title of a booklet by Isamu Kawakami, General Secretary of the International Service Bureau and National Peace Council of Japan. The Writer examines the conflict in Japan between the prevailing sentiment of national honor and those who feel a strong sense of international morality. He shows how education is being starved by militarism and believes that the influence of the press and the teachers is being exerted in favor of the newer and broader ideas of international morality. Copies of this booklet may be obtained from Mr. Isamu Kawakami, General Secretary, National Peace Council of Japan, Room 27, National Y. M. C. A. Building, 10 Omote Saragaku-Cho, Kanda, Tokyo.

A. P. H. R.

UNUA LEGOLIBRETO: K. Brüggemann. Esperanto Verlag Friedrich Ader, Bamberger Strasse 43, Dresden A. 27, Germanujo, 64 pp., 16-mo. Part 1 of *Universala Biblioteko*. Price 36 marks at current exchange. An excellent manual of medium difficulty. Consists of stories, fables, and legends, some of them adapted to children but most of them interesting to older people. They cover a wide range, being drawn from the Bible, Grimm's Fairy Tales, old German and Arabian legends, and so on. Written in simple but excellent Esperanto.

Dua Legolibreto: as above. No 2 of *Universala Biblioteko*. A wide range of selections drawn from literature, arts and sciences. We pass from Ceylon to Italy, from Lohengrin to Abraham Lincoln, from painting to sculpture, from Ruth and Esther to Willam Tell. The selections are of a more advanced grade, but in the clear and simple style of the first book. These are excellent manuals to carry in the pocket and read as opportunity offers.

AKORDOJ ESPERANTAJ: M. L. Kaplan. Eldonejo: J. Sapiro, Lipowa 33, Bialystok, Polujo. 32 pp. 16-mo. Prezo mankas. A small collection of poems on a variety of subjects, written in a smooth and easy-flowing style. The writer shows more respect for Esperanto than most versifiers as he obtains his rhymes and meter without cutting off the ends of half of the words.

DU POEMOJ: E. Mihalski. Esperantista Eldonasocio "La Nova Epoko," 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5. Moskvo, Rusujo. 16 pp. 16-mo. Prezo, Sm. 0.10. Rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio. Two delightful poems, disfigured however by clipping so many words. The first one, "Papilio," is written in broken verse—stanzas of different lengths and meters—in imitation of the flight of a butterfly.

The second, "Printempajoj," is similar in style and records different impressions of the springtime, ending with

Ni nin levas de sur molaj
Herboj verdaj, rosebrilaj
Kaj revenas senparolaj
Kun la koroj pac-trankvilaj.

KRIOJ DE L' KORO: Salo Grenkamp-Kornfeld. Eldonejo "Esperantista Voĉo," Oskar Ziegler & Ko., Markttredwitz, Bavario. 30 pp. 16mo. Prezo Gmk, 15. Another interesting group of poems, many of them spoiled by clipped words. Not devoted entirely to love poems as some are written about Esperanto.

Kara estas lingvo nia,
Plej amika en la mondo
Estas esperanta rondo.
Esprim-riĉa, harmonia. k. t. p.

LA PAGIO DE L' REGINO: Eŭgeno Heltai kaj Emilo Makai. Tradukis Dro. Kolomano de Kalocsay. Prezo unu respondkupono. Rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio. 32 pp. 16-mo. Vendas Paulo Balkanyi, Budapeŝt, VI, Hajon, N. 15. A delightful comedy in one act and seven scenes, requiring five people and an interior setting. Was presented at the post-Congress festival in Budapeŝt, the 9th of August, 1921. The style is excellent although we sometimes note such liberties as "feliĉo" instead of "feliĉeco," and the housekeeper doesn't speak very pure Esperanto, which is probably intentional. The comedy is well worked up and there are several surprising twists to the action.

Leteroj al la Redaktoro

Mr. P. P. Christiansen, candidate for the Presidency in the last election in Usono, writes from Shanghai, China, where he saw for the first time a copy of *Amerika Esperantisto*. Mr. Christiansen has become an enthusiastic Esperantist. He says: I am pleased to advise you that in every city I have visited throughout Europe, Asia and Africa, I have found groups of Esperantists and the language has become of great value to me."

S-ro J. M. Kerr of Denver suggests that we introduce a Spanish section in *Amerika Esperantisto*. We rather like this idea. We will make a start in our next issue by providing some news of the movement in Mexico and South America.

S-ro J. D. Sayers kindly offers to help our Magazine by mentioning it in the series of Articles on Esperanto he is contributing to "The Golden Age." Thank you, S-ro Sayers.

S-ro J. H. Fazel sends us very encouraging news from Topeka. We are very anxious to provide something for everybody in the Magazine. Glad to have your suggestion that we give some easy Esperanto for beginners. We will certainly do this. A letter like yours, S-ro Fazel, is very helpful. Let us have some more.

We have had appreciative letters from S-ro Bardorf, our President, S-ro Parrish of Buffalo, Chairman of the Agada Komitato, and many other correspondents to whom we will reply by mail.

We have had letters addressed in various ways. To Toronto, which found us, fortunately; to our Box Address; to our Home Address; and even to one of the Advertisers in our pages. In order to avoid misunderstanding and delay in future we think it well that correspondents should address their communications to The Editor, *Amerika Esperantisto*, Box 123, Terminal A, Toronto, Kanado.

THE
"EDINBURGH"
Esperanto Pocket Dictionary
Esp.-Eng. & Eng.-Esp.
Cloth Binding \$0.75 Leather \$1.75
On sale at Esperanto Office or at leading Booksellers.
T. Nelson & Sons, Ltd., Toronto